Tio ĉi estas speciala aliĝilo por loĝantoj de latinamerikaj landoj kun speciale rabatitaj kotizoj.

Loĝantoj de Brazilo pagu al la aliĝ-adreso (BEL). Loĝantoj de aliaj landoj pagu al UEA aŭ kiel kutime (al siaj landaj perantoj aŭ simile).

La CO en Roterdamo akceptas aliĝilojn ĝis la 15-a de junio 2002. Post tiam, oni aliĝu surloke dum la UK.

POR ELEKTI LA ĜUSTAN KOTIZON BV. ATENTE LEGI LA ĈI-PAĜAJN KLARIGOJN.

**La kotizo ne estas repagebla,** senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo. **Bv. atenti** ke la oficialaj kotizoj estas fiksitaj en EUR. La Kongresa Administracio rezervas al si la rajton plialtigi la kotizojn en R$ se intertempe la valoro de R$ signife malaltiĝos rilate al EUR.

| **KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ:** (nur por aliĝkategorio C) | **ĝis 01 12 31** 1-a periodo | | **ĝis 02 03 31** 2-a periodo | | **ekde 02 04 01** 3-a periodo | |
|---|---|---|---|---|---|---|
| **Valuto** | EUR | R$ | EUR | R$ | EUR | R$ |
| 1. individua membro de UEA (ne inkluzivas MG): | 75 | 170 | 90 | 210 | 110 | 260 |
| 2. ne individua membro de UEA | 90 | 200 | 110 | 255 | 135 | 320 |
| 3. komitatano / kunulo / junulo / handikapulo, mem individua membro de UEA | 40 | 90 | 50 | 115 | 60 | 140 |
| 4. kunulo/junulo/handikapulo, ne individua membro de UEA | 55 | 120 | 70 | 160 | 82 | 190 |

**DIFINOJ**

**Individua membro de UEA:** Dumviva Membro (DM), Membro kun Jarlibro (MJ aŭ MJ-T), Membro-Abonanto (MA aŭ MA-T). *Ne temas pri Aligitaj Membroj kaj ne inkluzivas Membrojn kun Gvidlibro (MG).*

**Komitatano:** Tiu, kiu estas membro aŭ observanto en la Komitato de UEA en la momento de aliĝo.

**Kunulo:** Tiu, kiu loĝas samadrese kun la ĉefaliĝinto. Ĉefaliĝinto oni konsideras personon kiu pagas kotizon en kategorio 1 aŭ 2.

**Junulo:** Tiu, kiu naskiĝis inter 72 01 01 kaj 81 12 31 (inkluzive). Oni nepre notu la naskiĝdaton sur la aliĝilo.

**Handikapulo:** Tiu, kies handikapo nepre postulas akompananton (ekzemple blindulo), kaj kiu pruvis tion per kuracista aŭ simila atestilo, kiu klare indikas la tipon de handikapo.

**Senpage aliĝas:**
– infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 81 12 31;
– nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

**La kotizo ne inkluzivas** loĝadon, ekskursojn, bankedon kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperas en la Dua Bulteno. La kotizo inkluzivas nenian asekuron.

**Kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono.**

**Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de ricevo de la pago en la CO aŭ ĉe peranto. Aliĝilon sen kompleta pago oni ne traktos.**

**Kongresa Regularo** (ekstrakto): *"8. Kongresanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Kongresan Regularon, aŭ malutilas al la UK, kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas la UK."*

Kiu subskribas ĉi tiun aliĝilon, konfirmas sian respekton al la Kongresa Regularo kaj la laŭstatuta neŭtraleco de UEA, kiu organizas kaj aŭspicias la Universalajn Kongresojn.

**Se vi pagas al LKK aŭ peranto, sendu ankaŭ la aliĝilon al tiu.**
**Se vi pagas rekte al konto de UEA, sendu la aliĝilon al Roterdamo.**